


Lumo



**KVaKu pri la
UK en
Vankuvero!**

**Festante la 40-an
datrevenon de la
Universala
Kongreso de
1984**

KVaKu pri Vankuvero!

La Kanada Virtuala Kongreseto (KVak) estas Zoom-kunveno de kanadaj esperantistoj tra la tuta lando. Ĝi okazas dufoje ĉiun jaron kaj prezentas prelegojn, muzikon, liberan babiladon, aliajn indajn esperantaĵojn. En norda printempo ĝi komenciĝas iomete antaŭ 15:00 oriento en Otavo (12:00 pacifike / 13:00 montare / 14:00 centre / 16:00 atlantike / 19:00 UTC).

Ĉi-foje ni invitas ĉiujn por ekscii pri aŭ memori la unuan kanadan Universalan Kongreson de 1984 en Vankuvero! Se vi mem partoprenis tiun UK-n kaj havas memorojn aŭ fotojn, ni aparte invitas vin! Se vi pretus dividi viajn memorojn skribe aŭ intervjuje, bonvolu komuniki kun Kanada Esperanto-Asocio: informo@esperanto.ca.

Ĉi venonta sepa KVak okazos la 6-an de aprilo 2024! La Zoom-ligilo estas: us02web.zoom.us/j/84858386313.

Kunvena identigilo: 848 5838 6313

Pasvorto: 553284

Por tiuj, kiuj volas uzi telefonon (kaj ne interreton), jen listo de telefonnumeroj:

<https://us02web.zoom.us/j/kc22tfqLc0>

ĈEESTU!



KVaK7

KANADA VIRTUALA KONGRESETO
LA 6a DE APRILO • ESPERANTO.CA

12:00 PT • 13:00 MT • 14:00 CT • 15:00 ET • 16:00 AT

Festante la 40an datrevenon de la Vankuvera Universala Kongreso, 1984



UK 1984 KOMITATO
MARIE + WIN ZACHERL
JANE SLOAN
JEAN FREMONT
BRIAN KANEEN
MARK FETTES
WALLY DU TEMPLE
DICON MASTERMAN

Vankuvera Kongreso: 40 jarojn poste

Ĵenja Amis

Fine de la teatraĵo “1910” S-ro Mann diris, ke la Internacia Kongreso de 1910 kaj la Universala Kongreso de Montrealo estas ligitaj spirite, eĉ se pli ol cent jaroj jam okazis inter la du. Bone, la Vankuvera Kongreso de 1984 kaj la Montreala Kongreso de 2022 estas ligitaj eĉ pli ol ligitaj spirite. Ili estas intimaj, la frataj kongresoj. La ĉeforganizanto de la Vankuvera UK, Wally du Temple (BC) estis ankaŭ honora prezidanto de la LKK de Montrealo. Normando Fleury, la prezidanto de la LKK de Montrealo, estis ankaŭ la respondeculo (kune kun Zdravka, alia montreala LKK-ano) pri la antaŭkongreso en Montrealo en 1984. Guy kaj Merle Matte (Otavo) zorgis pri la taga ekskurso al Otavo dum la montreala antaŭkongreso de



La teamo de E@I (Peter Baláž kaj Dorota Rodzianko) kaj la vic-prezidanto de UEA, Fernando Maia, ricevis la faman artaĵon Komunikado de la Vankuvera UK kiel donacon. Foto: John Huang

1984, kaj pluraj personoj ĉeestis kaj aktivis por la du kongresoj.

Ĉi-jare ni festas la 40-jariĝon de la Vankuvera kongreso – la unua en Kanado, unu el nur malpleneto de la UK-oj en Norda Ameriko. Ni invitis plurajn personojn, kiuj organizis ĝin, kontribuis al ĝi kaj partoprenis ĝin. Ni esperas kolekti tiom da memoroj kaj rakontoj pri la unua kanada Universala Kongreso, kiel eblas. Ni intencas dediĉi la sekvan numeron de Lumo al la Vankuvera UK. Bonan partoprenon. Ĉu vi mem ĉeestis? Ni aparte bezonas vin dum KVaK, KAJ ni volas vian rakonton por Lumo!

Detaloj de KVaK: esperanto.ca/kvak. Sendu vian artikolon al la redakcio: yevgeniya.amis

KEA: prezidanta mesaĝo

Garry Evans

Nova jaro, nova estraro. Mi havas la honoron nomumiĝi nova prezidanto de KEA ekde januaro, kaj en la estraron ni bonvenigis Luis-on Obando (origine el Kolombio kaj nun loĝanta en Toronto), kaj Jordan-on Zero (kiu ekrespondecis pri niaj sociaj retoj). Mi volas elkore danki Geoffrey-on Greatrex pro sia senlaca laboro dum la du jaroj de sia mandato (kaj en diversaj postenoj de KEA dum pli ol 20 jaroj). Mi estas feliĉa, ke li daŭre estos en la estraro kiel vicprezidanto, kaj ke ankaŭ la estraranoj Raymond Brisebois (kasisto), Bob Williamson (sekretario), Ĵenja Amis (redaktoro de Lumo), Andrew Sly (kiu komencos respondeci pri kulturo kaj la KEA-arkivoj), kaj Trefleo Mercier (rilatoj kun Amerikaj landoj) restas en la estraro.

Mi sentas la grandan pezon de historio en mia nova posteno kiel prezidanto. Min antaŭiris multaj eminentaj esperantistoj, kiuj servis la asocion kiel prezidantoj ekde ĝia (re)fondiĝo en 1958: ekzemple, Wally du Temple (prezidanto

kvar fojojn: 1979-1981, 1988-1989, 2006-2007), Paul Hopkins, Bob Williamson, Merle Haltrecht-Matte kaj – en la pli fora pasinteco, do eble ne tiom bone konataj de la nuna membraro – Ciprian Jauca, Brian Kaneen, Paul Ronald, Lorcán Ó hUiginn, Ian Richmond kaj aliaj.



Mi taksas grave, ke ni konsciis pri nia historio, kaj – parte dank' al Wally du Temple – ni nun havas plurajn materialojn (interalie, malnovajn numerojn de Lumo, fotojn de Kanadaj Landkongresoj el la 1960-aj kaj 1970-aj jardekoj ktp). Ni planas ciferecigi ilin por la retejo de KEA, kaj konservi la originalojn en la Libraro Ludovika (la biblioteko de KEA, kiu

nuntempe troviĝas en la domo de Martin Morris en Kebekio).

Eble mi mallonge prezentu min. Mi sentas min humila konsiderante miajn eminentajn antaŭulojn. Mi estas nek lerta esperantisto, nek delonge Kanadano. Mi naskiĝis kaj kreskis en Britio, sed pasis la plejparton de mia vivo en Azio, en Japanio kaj Honkongo. Mi ja lernis Esperanton

kiel dekeljarulo per la fama lernolibro Teach Yourself... Mi memoras, ke je la fino de la libro estis skribite, "Se vi volas daŭrigi lernadon de Esperanto, bonvolu kontakti aŭ Esperanto-USA aŭ la Britan Esperanto-Asocion", kun adresoj de tiuj asocioj. Sed mi ne faris tion. Kiel estus ŝanĝiĝinta mia vivo, se mi estus nur skribinta tiun leteron! Mi remalkovris Esperanton kiam, antaŭ 10 jaroj, mi rimarkis, ke Google Translate komencis tradukan servon por la internacia lingvo. Mi sekve provis legi artikolojn de Vikipedio en Esperanto kaj trovis, ke mi daŭre plimalpli komprenas. Tiam mi tuj entuziasme komencis studi la lingvon denove.

Do, mi estas sufiĉe freŝbakita esperantisto, sed eble la plej novaj adeptoj estas inter la plej entuziasmaj! Mi translokiĝis al Montrealo en 2015 por daŭrigi mian karieron kiel ekonomikisto, kaj nun estas Kanada civitano (kvankam mi konservas ankaŭ mian Britan civitanecon). Eble multaj homoj plej konas min kiel Sinjoron Mann en la teatraĵo "1910" de Ĵenja Amis, kiu prezentiĝis dum la Universala Kongreso en Montrealo en 2022.

Kiel asocio, KEA alfrontas kelkajn defiojn. La membraro iom ŝrumpis dum la lastaj kelkaj jaroj, kaj nun riskas fali sub 100 membroj, la limo por havi la rajton nomumi komitatanon de UEA. Kanado estas grandega lando laŭ areo sed ne laŭ

loĝantaro, tial estas malfacile kunvenigi membrojn regule en unu lokon. Mankas iomete junuloj kaj virinoj en la movado nialande.

Por rekonsideri la strategion de KEA kaj provi revigligi la asocion, mi starigis laborgrupon, kiu elpensu rekomendojn kaj prezentu raporton al la estraro ene de kelkaj monatoj. En la laborgrupo estis kelkaj KEA-estraranoj sed ankaŭ entuziasmaj aktivuloj, Andy Blair, Laetitia Bert, kaj Nicolas Viau (prezidanto de la Esperanto-Societo Kebekia), kiuj espereble kunportos freŝajn ideojn al niaj diskutoj.

Ni ŝatus ankaŭ aŭdi de vi, la membraro. Plue, ni diskutos strategion dum unu el la sekvaj Kanadaj Virtualaj Kongresetoj (KVaK). Kion KEA povas fari por helpi kaj subteni la lokajn Esperanto-klubojn en Kanado? Kiel reklami Esperanton inter la ĝenerala publiko? Kiel altiri pli da homoj al Esperantujo? Se vi serĉas en lernu.net, vi trovos, ke 5725 homoj el Kanado registris sin en tiu retejo. Nekredeble granda nombo, ĉu ne? Kompreneble, ilia aliĝo al lernu.net ne signifas, ke tiuj homoj eĉ eklernis Esperanton, sed almenaŭ direblas ke ili iam interesiĝis pri nia afero. Ni devas eble altiri pli el ili al aktiva uzo de Esperanto kaj aliĝo al KEA. Ni atendas viajn sugestojn, proponojn, ideojn.


MeKaRumu Montreale:

18-20-a de majo, 2024

MeKaRo (Mez-Kanada Renkontiĝo de Esperanto), estas kunveno de Esperanto-parolantoj ĉefe de Kebekio kaj Ontario, kiu okazas ĉiujare dum la longa semajnfino de la Nacia Tago de Patriotoj (*Journée nationale des patriotes*) en Kebekio kaj la Viktorina Tago en Ontario kaj la cetero de Kanado, maje. Temas pri turisma kaj socia semajnfino. Kutime oni sufiĉe multe promenas kaj vizitas muzeojn aŭ gravajn historiajn lokojn. Ni ne forgesu ankaŭ mencii, ke kutime ankaŭ estas vespera programo! MeKaRo okazas alterne en Kebekio kaj Ontario, ĉiufoje en malsama urbo. Partoprenas ĝin multaj homoj de ambaŭ provincoj sed ankaŭ multaj Usonanoj.

Ĉi-foje MeKaRo okazos en Montrealo. Atendas vin bunta programo, kun vizito al Biodôme, ekskursoj urbaj kaj eĉ ekskluziva postkongresa promeno al la tombejo de la parencoj de Zamenhof, kun la rakonto pri la vizito de Majstro al Montrealo. Ni esperas vidi vin tie!

Pli da informoj kaj aliĝilo en la retejo de ESK:
esperanto.qc.ca. Subvencioj haveblas! Skribu al:
informo@esperanto.ca. Ni esperas vidi vin tie!



Fotoj: Vikipedio, Creative Commons, CC BY-SA 4.0

Ekparolu kun edukado.net!

Garry Evans (onklo)



Esperanto: Por tiuj kiuj jam lernis la bazon de Esperanto, sed ankoraŭ neniam havis konversacion en Esperanto, aŭ ne tre memfidis, ni sugestas aliĝi al Ekparolu! Tiu servo aranĝos por vi 10 senpagajn sesiojn per Skajpo kun spertaj esperantistoj. Estas eĉ en Kanado kelkaj "geonkloj" kiuj helpos vin plibonigi vian fluecon en Esperanto.

English: For those who have already learned the basics of Esperanto, but have never had a conversation in Esperanto, or lack confidence, we suggest joining Ekparolu! This service will arrange for you 10 free sessions via Skype with


experienced Esperantists. There are even some "geonkloj" (mentors) in Canada who will help you improve your fluency in Esperanto.

Français: Pour ceux qui ont déjà appris les bases de l'espéranto, mais qui n'ont jamais eu de conversation en espéranto, ou qui manquent de confiance, nous suggérons de rejoindre Ekparolu! Ce service organisera pour vous 10 sessions gratuites via Skype avec des espérantistes expérimentés. Il y a même quelques "geonkloj" (mentors) au Canada qui vous aideront à améliorer votre fluidité en espéranto.

<https://edukado.net/ekparolu/prezento>

ekparolu

Esperanto: nekunhavebla en norda Ontario...



Antaŭ pli ol dek jaroj, mi atendis la eldonon de la ruslingva kurso de Duolingo, sed dank' al defieto lerni plejeble multe da Esperanto ene de nur du semajnoj fare de iu poligloto, kies nomo mi antaŭ longe forgesis, mi deiris de la tiame celata vojo relerni la rusan kaj eklernis Esperanton nur por distri min. Mi enamiĝis al la lingvo kaj fine de tiuj du semajnoj mi tiel multe ĝuis la lernadon kaj novan mondon de Esperantujo, ke mi flankenlasis la rusan.

Eble du jarojn poste, kiam mi taksis min sufiĉe scipova en la lingvo, mi volontulis por estri lokan grupon de Duolingo-lernantoj. Malgraŭ la antaŭavertoj de la reprezentanto de Duolingo, ke mi estu preta, ĉar la unuan renkontiĝon ĉeestus certe kelke da homoj, neniuj ĉeestis. Mi daŭrigis la ĉiusemajnajn renkontiĝojn dum du monatoj, sed

neniuj venis. Tio multe surprizis min, ĉar, kvankam mi loĝas en iu el la pli grandaj urboj en norda Ontario, kaj fakte la kvindek-unua plej granda urbo en Kanado, mi ne povis kompreni, kial jam ne estas eĉ unu alia parolanto en urbo, kie troviĝas grandaj kolegioj kaj universitato. Mi ride demandis min, ĉu mi estas "unikornulo"?

Mi poste kredis, ke mankas aliaj esperantistoj en mia urbo, ĉar la lingvo estas nekonata. Do mi pasigis pli ol jaron farante filmetojn esperante kun anglaj subtekstoj traktantaj lokajn historiojn kaj aferojn, sed rapide mi trovis min barita de la ĉefa Facebook-grupo en mia urbo. Laŭ la grupestro, la kialo estis "komerca agado", malgraŭ tio ke mi ne petis monon. La grupestro plu klarigis, ke neniuj aliaj personoj en la grupo parolas la lingvon, kaj tial neniuj povus esti certa pri tio, kion mi reale diras

(supozeble mi kaŝus sekretajn mesaĝojn en la filmeto?).

Ene de tiu tempodaŭro mi ankaŭ sendis al la loka gazetaro anoncojn verkitajn de la KEA pri Esperantaj eventoj, agadoj, k.s., sed oni tute ignoris min. Mia sperto, dum mi penis kunhavigi Esperanton en norda Ontario, montris, ke aliaj homoj forte malfidas la lingvon, kredante ĝin iel suspektinda, kaj indignas pri la peto ne nur lerni la lingvon, sed eĉ lerni pri la lingvo.


Mi profunde bedaŭras devi raporti, ke pluraj jaroj da penoj konigi la lingvon en norda Ontario montras, ke aliaj homoj tie trovas la lingvon ĝena kaj suspektinda, kaj ili aŭ ignoras la lingvon aŭ aktive forpelas ĝin. Mi ne scias, kiel superi tiujn reagojn, sed mi ja scias, ke mi ne estas unikornulo. Multaj el ni ĝuas la lingvon kaj nian verdan kulturon, kaj laŭraporte pli da homoj unuafoje renkontas kaj eklernas la lingvon ĉiutage. Mia opinio, por sukcese kunhavigi la lingvon al neparolantoj, ni devas unue kompreni, 1) kiu emas lerni la lingvon, kaj 2) kial? Sen tiuj respondoj, nia lerninda lingvo kaj unuiga komunumo restos nekunhaveblaj.

Redakcio: Ĉu vi loĝas en Sault Ste. Marie aŭ la regiono? Kontaktu la [aŭtoron de tiu artikolo!](#) Elkoran dankon!

Verdigo de urboj

Bob Willamson

Ĉu vi konas la podkaston kern.punkto.info? Farata de Eva Fitzelová kaj Johannes Mueller en Germanio, ĝi temas pri tekniko, kulturo, kaj socio. Jam troveblas 215 programeroj en kiuj, dum proksimume horo kaj duono, oni intervjuas spertulon pri interesa temo. En la 212-a programo, nia Normando Fleury parolis pri la Verdigo de Urboj. Dum sia kariero plejparte en Montrealo, Normando laboris pri novaj konceptoj por la urba ekosistemo. [Aŭskultu kaj ĝuu interesan diskuton kun kanada spertulo](#)



Lingva kapablo

Bob Williamson

Kiel bone vi regas la lingvon Esperanto? Ĉu vi kontentas pri via kapablo kompreni la parolitan lingvon aŭ pri via lerteco flue paroli ĝin? Ĉu vi facile legas ĉi tiun tekston, aŭ ĉu vi konstante uzas vortaron aŭ tradukilon por kontroli la vortojn, kiujn vi legas kaj verkas? Se vi daŭre uzas vortaron, mi gratulas vin pro via rezoluteco. La reta PIV (vortaro.net) estas bonega elekto.

Kompreneble, preskaŭ neniu el ni estas denaskuloj. Komence de la sperto, Esperanto estis tute fremda lingvo. Ni ĉiuj devis eklerni ĝin, kaj ni devis multe ekzerci nin por sufiĉe kontentiĝi pri la uzado. Pliboniĝo dependis ankaŭ de nia daŭra inklino strebi kaj de nia vivsituaĉio, kiu eble ne provizis sufiĉe multan tempon por daŭre progresi.

Kiel iom mallaborema veterano, mi mem bone komprenas tion. Mi spertadis kaj daŭre spertas defiojn. Frue mi trovis metodojn, kiuj multe helpis al mi: korespondado (kun vortaro), aŭskultado de podkasto (ekzemple, pola-retradio.org), poste legado kaj verkado, kaj partoprenado en movadaj

aferoj. Post la emeritiĝo, pli da tempo haveblis al mi; mi eĉ povis ĉeesti TAKE en 2008 kaj la UK-ojn de 2009 kaj 2022. Ekde la erao de retkunvenoj, mi sentis min pli kaj pli komforte en la parolkapablo.

Ju pli multe da rekta partoprenado, des pli multe da progreso. Survoje mi ĉiam trovis novajn konatojn kaj amikojn.

Eble eĉ pli grave, mi iom post iom trovis, ke la internacia lingvo fariĝis la mia lingvo. Certe estas la dua post la gepatra lingvo, sed ne plu estas fremda lingvo. Ĝi ja apartenas al mi.

Certe mi stumblas de tempo al tempo (kiel en la gepatra), sed perfekteco bezonas praktikadon. Retkunvenoj (vidu EventaServo.org) kaj legado (vidu biblioteko.ca/) multe helpas.

Parenteze, se vi bezonas ĝin, la retejo de KEA havas aŭtomatan tradukilon al la angla kaj franca. Tio faciligas la komprenon por neesperantistoj, kaj ankaŭ por ni.

Feliĉan ĝuadon de nia lingvo!



Tago de la gepatra lingvo

Bob Williamson

La 21-an de februaro 2024, UEA refoje festis la Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo per Gazetara Komunikilo (GK), kiu celis antaŭenigi “la gravecon de lingva diverseco kaj multlingva edukado.” Montrita estis la afiŝo kiun ankaŭ publikigis [Esperanto por UN](#) en 37 lingvoj krom la esperanta, kaj tiu [GK n-ro 1154](#) en 18 lingvoj aldone al Esperanto.

La 21-an de februaro 1999, Unesko proponis la Internacian Tagon de la Gepatra Lingvo al la Unuiĝintaj Nacioj, kiu festis ĝin la sekvan jaron. La dato memorigas tumultojn je tiu dato en Dako, tiam Orienta Pakistano (nun Bangladeŝo), kiam polico mortigis kelkajn studentojn kiuj manifestaciis por la Movado por bengala lingvo. Post naŭmonata civila milito, orienta Pakistano deklaris en 1971 sian sendependecon de Pakistano. Depost tiam, la nacia lingvo de la nova ŝtato Bangladeŝo estis la bengala.

Ĉi-jare dum sabata posttagmezo, la kvar esperantistoj de Halifakso partoprenis en la ĉefa biblioteko tiun feston, organizita de la Bangladeŝa



Komunuma Asocio de Nov-Skotio. Ni montris afiŝojn kaj librojn, donis broŝurojn kaj informkartojn, kaj paroletis kun diversaj scivolemuloj kiuj ofte sciis nenion pri Esperanto. Bedaŭrinde, nia partopreno apenaŭ gravis. La evento plimulte celis celebri la bengalan kulturon, kun pripensa diskuto pri edukado por minoritataj lingvuloj. Ankaŭ bedaŭrinde, oni ne malfermis la grandan muron malantaŭ la teatro por permesi la ceteran publikon ekscii pri kaj rigardi la eventon. Estis belaj, eĉ kortuŝaj prezentaĵoj de kantistoj, dancistoj, kaj tamburistoj kiuj montris la diversecon de lingvaj komunumoj. Oni laŭvice ornamis per floroj fidelan imitaĵon de la Ŝahid Minar (martira monumento). Tamen, krom kelkaj minutoj por rakonti esperantlingvan rakonton al la infanoj kaj paroleti kun gepatroj, restis malgranda influo de ni. Oni povus eĉ diri, ke tio ne estis nia celpubliko. Pro tio, nia grupeto devos zorge pripensi, ĉu ni kapablas plimulte influi la eventon venontjare, aŭ ĉu ni rezignu pri partopreno en tia festotago.

Esperanto kaj lingva diverseco: ĉu bonintenca kontraŭdiro?

Francisko Lorrain

Redakcio: tiu artikolo estis verkita kaj proponita por publikigo en Revuo Esperanto (malakceptita, sen klarigoj) antaŭ jam iom da jaroj. Lumo kun plezuro akceptis tiun tre bone argumentitan artikolon, kiun mi mem legis antaŭ jaroj, kaj trovis publikiginda. La artikolon verkis nia kara kunlaboranto kaj provlegisto de Lumo. Eble, la enhavo tamen surprizos iujn legantojn. Ĉu vi konsentas? Ĉu vi malkonsentas? Donu vian opinion! Lumo ne hezitas akcepti artikolojn, kiuj lanĉas al respekta debato kaj donas la eblon esprimi diversajn opiniojn — Ĵenja Amis.

De jaroj UEA-reprezentantoj kaj multaj aliaj aktivuloj insistadas, ke unu el la gravaj celoj de nia movado estas helpi konservi la tutan buntecon de la nuna homa lingvaro. Celo laŭdinda, certe — sed laŭ mi neniel akordigebla kun tio, ke ni samtempe proponas Esperanton kiel internacian pontlingvon por la tuta homaro. Kial do?

1. Veras, ke multaj el la nunaj esperantistoj ŝatas lingvojn, organizas lingvajn festivalojn kaj bedaŭras la konstantan iom-post-ioman malaperon de lingvoj tra la mondo. Mi estas mem unu el tiuj. Sed ĉu tia estus la plimulto de la

esperantoparolantoj en mondo, en kiu Esperanto estus iĝinta grava mondlingvo? Ne: la plejparto estus lerninta la lingvon devige aŭ pro ia avantaĝo profesia, mona, pova, ktp.

2. Se Esperanto fariĝus la plej grava monda lingvo, anstataŭ ajna nacia lingvo, tio estus ja pli justa, en la senco, ke la homoj almenaŭ tiam iĝus lingve pli egalaj. Jes. Sed la rezulto fakte ne estus tiel ideala. Oni konsciu, ke eĉ tiam la parolantoj de latinidaj aŭ ĝermanidaj lingvoj, kaj pli ĝenerale tiuj de eŭropaj lingvoj, havus averaĝe grandan avantaĝon, kompare kun tiuj ne scipovantaj tiajn

lingvojn.

3. Jen nun aserto, kiu surprizos multajn: se Esperanto vaste disvastiĝus kiel monda lingvo, tiam, laŭ mi, la nunaj naciaj lingvoj povus malaperi eĉ pli rapide ol okazas nun! Male, male, vi replikos! Nu, bone pesu la sekvajn punktojn.

a. En nia kirliĝanta tutmondiĝanta socio, la homoj pli kaj pli vojaĝas alilande, amikiĝas, geedziĝas kun alilandanoj. Ili pli kaj pli envolviĝas en internaciajn rilatojn, kaj en sia privata kaj en sia publika kaj labora vivo.

b. Se Esperanto iĝus grava mondlingvo, do, ĝi neeviteble pli kaj pli enmiksiĝus en la vivon de ĉiuj, en multegaj kampoj, kiel la angla nun faras. *Sed ĉu tiu enmiksiĝo de Esperanto estus pli aŭ malpli ampleksa ol tiu de la angla? Jen la kerna afero. Diskutas ĝin la sekvaj alineoj.*

c. La angla diversmaniere trudas sin, *parte pro la kolektiva potenco de la anglalingvaj landoj. Povus esti, ke Esperanto trudas sin sammaniere, ekzemple, se ĝi iĝus oficiala lingvo de Eŭropa Unio, kie ĝi vikle disvastiĝus, kio poste devigus aliajn landojn mem uzi ĝin, nur por rilati kun Eŭropo! Sed ni supozu, ke tio ne okazus, kaj ke*



Esperanto estus tutmonde adoptita, pli malpli samtempe. Do la premo lerni Esperanton en la mondo estus, almenaŭ parte, alispeca ol la premo nun lerni la anglan.

ĉ. Sed la angla nun disvastiĝas ne nur per politika-komerca trudado, sed ankaŭ simple tial, ke la mondo bezonegas ian interlingvon, por komerci, intertrakti, interŝanĝi, interrilati. Kaj al la sama bezonego respondus Esperanto, sed sen same trudi sin.

d. Ĉu la maltruda Esperanto, mondlingviĝinta, malpli enmiksiĝus en la vivojn de ĉiuj, ol la angla nun? Tio ne evidentas. Altrudo vekas reziston. Krome la angla multrilate malfacilas. Male, Esperanto kaj pli facilas, kaj pro sia neŭtraleco vekus malpli da rezisto. Tute ne estus surprize, se Esperanto tiam eĉ *pli enmiksiĝus en niajn vivojn, ol faras la angla nun! Kiel tia amasa enmiksiĝo efikus je la naciaj lingvoj?*

e. Lingva komunumo povas vere pluvivi, en vigla, daŭripova maniero, nur se ĝiaj anoj ĉiutage inter si multe parolas kaj uzas ĝin, en multaj vivsferoj, en multaj kampoj. Cetere, tial la esperantistaro ĝenerale — inkluzive min — ne tiel bone regas la

internacian lingvon.

f. Kaj, se mondlingvo, ĉu la angla, ĉu Esperanto, ĉiam pli kaj pli enmiksiĝos en la vivon de ĉiuj, tiam neeviteble la naciaj lingvoj daŭre perdos terenon, iom post iom. La procezo verŝajne daŭrus jarcentojn, kompreneble (estas konate, ke tiaj ŝanĝiĝoj estas malrapidaj). Oni jam observas tiun procezon en Eŭropo, kie la angla daŭre alproprigas al si pli kaj pli grandan lokon. Ĉu estus alie kun Esperanto? Ne: se unu lingvo pli kaj pli uziĝas, tiam uziĝas malpli kaj malpli la aliaj — simpla matematiko.

g. *Konklude, se, kiel estus verŝajne, mondlingviĝinta Esperanto pli enirus en niajn vivojn, ol la angla faras nun, tiam des pli rapide erodiĝus la naciaj lingvoj (tamen nur iom post iom, jarcenton post jarcento).*

ĝ. Bedaŭrinda konkludo, ĉu ne? Ĉu viglaj lingvaj politikoj en ĉiu aparta lingvio povus helpi renversi tiun prognozon? Parte, certe. Kiel kebekiano, mi iom scias pri viglaj lingvaj politikoj. Mi tute ne kontraŭas ilin, male! Sed mi vidas, ke ili nur malrapidigas la enmiksiĝan procezon — en komerco, politiko, universitatoj, scienco, ktp.

Ĉu do iam, post jarcentoj, aŭ eĉ jarmiloj, la tuta homaro parolos nur unu saman lingvon? Tio ja eblas. Zamenhof cetere ne bedaŭrus tion: “Ni konfesas, ke kiom ajn ni rompis al ni la kapon, ni

neniel povis kompreni, en kio nome konsistus la malfeliĉo, se en unu bela tago montriĝus, ke ne ekzistas jam plu nacioj kaj lingvoj naciaj, sed ekzistas nur unu ĉiuhoma familio kun unu ĉiuhoma lingvo.” (El “Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia”, II, en *Fundamenta Krestomatio*.) *Malofte citata frazo, ĉu ne? Nu, mi ja bedaŭrus la malaperon de la bunta vivanteco de nia dum jarmiloj disvolviĝinta lingvaro. Sed eble ĝuste tiu malapero estas parto de la prezo, kiun devos, frue aŭ malfrue, pagi la homaro por sia unuiĝo!*

UEA devas aŭ tute forlasi, forĵuri ĉian finvenkisman, aŭ tute forlasi tiun strangan ideon, verdire ĉiam nur nebule klarigitan aŭ pravigitan, ke iel mirakle Esperanto per si mem, per siaj bonaj ecoj, aŭ per la bonaj ecoj kaj intencoj de siaj parolantoj, helpus la homaron konservi siajn lokajn lingvojn. Tiuj du celoj rekte kontraŭdiras unu la alian.

François (Francisko) Lorrain estis prezidanto de la unua eldono de INK (La Interkultura Novelo-Konkurso), la redaktoro de la lasta eldono de *La Eta Princo* kaj tradukinto de *Kristnaskaj Rakontoj el Franca Kanado*. Krome, li estas fidela korektanto de *Lumo* (en la pasinteco, *La Riverego*). Sur la foto, li prelegas pri *Kristnaskaj Rakontoj* dum la unua Virtuala Kongreso de UEA.

Kio diable estas Esperanto-sumoo?

Garry Evans

Ĉu vi ŝatas legi librojn en Esperanto, sed ĉiam forgesas? Ĉu vi volas ion por instigi vin pli ofte legi en Esperanto? Esperanto-sumoo povas helpi vin.

Sed, kial sumoo (la japana luktosporto, en kiu du dikegaj homoj provas puŝi unu la alian ekster la rondon dum luktoj, kiuj kutime daŭras nur sekundoj) iel ajn rilatas al Esperanto?

Sumoaj turniroj okazas sesfoje jare en Japanio en neparaj monatoj: januaro, marto, majo, julio, septembro kaj novembro. Ĉiu turniro daŭras 15 tagojn, de dimanĉo al dimanĉo.


En 2009 sinjoro Jasuo Hori el Japanio ekhavis la ideon organizi Esperanto-legadan konkurson je la sama frekvenco. Dum 15 tagoj partoprenantoj ĉiun tagon legu libron. Ĉiu partoprenanto povas elekti sian libron kaj la kvanton da paĝoj, kion ŝi aŭ li intencas legi ĉiun tagon. Se vi estas komencanto, vi povas decidi simple legi *Gerda Malaperis* po du paĝojn tage; spertaj esperantistoj po 30 paĝoj de *La*

Litomiŝla Tombejo de Karolo Piĉ (eble la plej malfacile komprenebla romano en Esperanto). Partoprenanto, kiu plenumas sian tagan taskon, havas unu venkon. Ne vere temas pri konkurso, ĉar ne ekzistas venkintoj aŭ ĉampiono. Vi kvazaŭ luktas kontraŭ vi mem por atingi perfektan

rekordon de 15 venkoj dum la du semajnoj. Sed la solidara sento, ke vi legas kune kun 300 aliaj esperantistoj tra la tuta mondo, eble donos al vi pli da disciplino por legi ĉiun tagon kaj ĝui la legadon de Esperanto-libroj.

La aliĝmaniero estas simpla. La tuta regularo troveblas en la [retejo de Esperanto-sumoo](#). Por komenci, sendu retmesaĝon al S-ro Hori horizonto@r.water.sannet.ne.jp kun

vijaj detaloj. Krom la libro, kiun vi planas legi, vi elektu luktistan nomon. Mi estas Gario, sed plejparte homoj elektas pli buntan nomon kiel Horizonto (S-ro Hori mem), Fiŝino aŭ Esploristo.



Dum la konkurso, vi raportu al via prizorganto ĉiun kvinan tagon pri viaj venkoj aŭ malvenkoj. Esperanto-sumoo ĉijare verŝajne okazos de la 10-a ĝis la 24-a de marto, 12-26-a de majo, 14-28-a de julio, 8-22-a de septembro, 10-24-a de novembro (laŭ la turniroj de la Japana sumoo, sed povas okazi ke S-ro Hori ŝanĝas datojn pro siaj propraj farenadaĵoj).

En la januara Esperanto-sumoo ĉijare partoprenis 313 luktantoj el 38 landoj, sed bedaŭrinde nur du el Kanado: Vaughn Seward el Edmontono kaj mi. El la pasinteco, estis 1-2 aliaj kanadaj partoprenantoj, sed neniam pli ol kvar. En januaro, Kanado estis nur en la 22-a loko laŭ lando (egale kun DR Kongo). Estus bone, se ni povus kuraĝigi pli da esperantistoj el Kanado partopreni.

Sed kie trovi libron por legi? Ne forgesu pri [Libraro Ludovika](#), biblioteko de la Kanada Esperanto-Asocio, kiu enhavas la plej grandan kolekton de Esperantaj libroj en Norda Ameriko (proksimume 3000). Se vi estas membro de KEA aŭ de Esperanto-Societo Kebekia, vi rajtas pruntepreni librojn. La biblioteko eĉ sendos la librojn al vi poŝte senpage – vi devas pagi nur la resendan koston. Se vi preferas legi bitlibrojn, vi trovos multajn [sugestojn](#) en la retejo la Esperanto-sumoo.

Recenzo pri *La Kanada Verkaro*

Literatura Foiro 325 (oktobro 2023) aperigis bonegan recenzon pri La Kanada Verkaro. Verkis la recenzon konata Carlo Minnaja. Li estas denaska Esperanto-parolanto kaj vortaristo kaj membro de la Akademio de Esperanto.

Frukto de bona kunlaboro

La tiel nomataj “grandaj literaturaj” havas jam antologion en esperanto: tiel la angla, la germana, la itala k.a.; la svisa proponas dividitajn ĉerpajojn el la kvar oficialaj lingvoj de Svislando, la belga havas kaj flandran kaj franclingvan partojn.

Kiuj lingvoj parolatas en Kanado? Estas ja la franca, la angla kaj tuta amaso da indiĝenaj, kutime ne prisciataj de la eŭropaj aŭ eŭropevenaj kulturoj. Tial prave la unua paĝo memorigas pri la Deklaracio de UN pri la rajtoj de la Indiĝenaj Popoloj, akceptita en 2007, kies unua artikolo tiel sonas: *Indiĝenaj popoloj rajtas je plena ĝuado, kiel kolektivo kaj kiel individuoj, de ĉiuj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj tiel kiel ili estas rekonataj en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj la internacia homrajta juro.* Sincere dirite, tia deklaro estis por mi surprizo, ĉar mi neniel supozis, ke por diri ion tiel naturan kaj evidentan por ĉiuj personoj de la mondo necesas specifa UN-deklaro, kvazaŭ la indiĝenaj popoloj estus paria apendico de la “veraj” popoloj, kies rajtojn oni devas agnoski aparte. Sed eble tio ŝuldiĝas al la fakto, ke UN misgvide sin nomas

per “nacioj”, dum ĝi estas asocio de suverenaj “ŝtatoj”, kio kondukas al la maldemokrata kontrolo, ĉu iu komunumo estas agnoskata kiel ŝtato de la ceteraj. Ne ja senkaŭze ekzistas organizaĵo de Neagnoskitaj Nacioj aŭ Popoloj (UNPO, *Unrepresented Nations and Peoples Organization*), fondita en 1991, kie membras indiĝenaj popoloj, okupataj nacioj, minoritatoj kaj ŝtatoj aŭ teritorioj mankaĵe internacia diplomatia reprezento, kaj kie nature, la Esperanta Civito estas en ĝi observanto ekde 2011, reprezentante de la esperantlingvanoj.

Post antaŭparoloj de G. Greatrex, prezidanto de Kanada E-Asocio, kaj de D. Astori, profesoro pri ĝenerala lingvistiko kaj interlingvistiko en la universitato de Parma (Italio), la recenzata verko agnoskas, ke kanadaj estu konsiderataj verkistoj kaj tradukintoj vivantaj sur la necedita Teritorio de la Indiĝenaj Popoloj, kie pluas subpremoj kaj ankoraŭ regas promesoj pri memdeterminado, kaj ke la Artoj kontribuas al resaniga kaj malkoloniiga vojaĝo. Tiun indiĝenecon simbolas la kanuo, kiu ne nur estas simbolo de vojaĝado, sed estas la vehiklo kiu akompanis la tradicion de la indiĝenaj popoloj.

recenzas
Carlo Minnaja

Wally G. du Temple
(red.) kun dek ok
kunlaborantoj:
La Kanada Verkaro
Eld. La Societo por
Kanada Antologio,
2023.

Centjariĝo de Marjorie Boulton

Geoffrey Greatrex


Je la 7-a de majo ĉi-jare oni festos cent jarojn post la naskiĝo de Marjorie Boulton. La daton mi tre facile memoras, ĉar nur du jarojn poste (precize) naskiĝis mia propra patrino, kiu, feliĉe, daŭre vivas (en Britio). Oni festos ĉi-jare ankaŭ la centjariĝon de William Auld, longtempa amiko de Marjorie, kompreneble. La brita Esperanto-Asocio tial anoncas 'festjaron Bauldton' kun kongreso en Oksfordo; ĉu la kunmetita nomo vere funkcias en Esperanto, jen malfacila demando.

La kontribuo de Marjorie al la Esperanto-literaturo certe ne dubindas. Multaj jam komentis

tion, ekz. Humphrey Tonkin donis belan prelegon en la UK en Torino pasintjare pri ŝia traduko de

Koriolano de Shakespeare. Mi unuafoje renkontis Marjorie en Oksfordo en oktobro 1986. Ĝus alveninte tie por studi la klasikan mondon ĉe kolegio Exeter, mi partoprenis la tiel nomatan 'flavbekulan foiron' ('Freshers Fair' en la angla, la

traduko estas tiu de Marjorie). Je la budo de la loka asocio deĵoris, kontraste kun ĉiuj aliaj apudaj budoj, du maljunulinoj – Marjorie kaj Kate Hall. Ili certe surpriziĝis, kiam mi alparolis ilin per komenca 'Saluton': mi faris senpagan kurson



(neoficiale) en mia lernejo en la antaŭa jaro. En la sekvaj jaroj mi ofte ĉeestis interesajn prelegojn en la domo de Marjorie en Stockmore street, kiam venis pluraj eminentaj samideanoj. Ĉiam ŝi provizis la ĉeestantojn per belaj frandaĵoj kaj trinkaĵoj.

En la kanada kunteksto, ni memoru la belan amikecon, kiu naskiĝis inter Steĉjo Norvell kaj Marjorie. Mi memoras, ke mi parolis al Marjorie pri Steĉjo post mia unua vizito al Halifakso en 1992, kaj evidente mi pli bone konatiĝis kun li, kiam mi forlasis Oksfordon en 1998 por loĝi en Halifakso (1998-2001). En 1994 Marjorie venis al Halifakso, kie ŝin gastigis Steĉjo dum kvar tagoj, antaŭ ol ili ambaŭ veturis al Ludlow, Vermont, por ARE. La du korespondis regule post tiam, kaj en la sekva jaro ŝi kontribuis poemon al la novskotia revuo, *Inter Ni*.

Ĉiam, kiam mi revenis al Britio, mi vizitis Marjorie en Oksfordo; ĝenerale, almenaŭ dum eblis, ni eliris manĝi en apuda hinda restoracio, ĉar spicaj

manĝaĵoj plaĉis al ŝi. En 2014, kun la helpo de ŝia antaŭa kolegio, Somerville, mi organizis 90-jariĝan feston por ŝi, kiun ĉeestis pluraj samideanoj, ne

nur britoj. Ŝi donis belan prelegeton pri la kolegia vivo en sia tempo, kiam ŝi konis (inter aliaj) la faman verkistinon Iris Murdoch. En la sekva jaro, per la helpo de sia flegisto Maciej Mirnowicz, ŝi partoprenis la 100-an UK-on (en Lille). Kvankam ŝi tiam malmulte mem parolis, dum la aŭtora duonhoro dediĉita al ŝi, pluraj homoj atestis ŝian bonkoremon kaj donacemon en ŝiaj rilatoj kun aliaj (ekz. per sendo de donacoj al la orfejoj en Brazilo).

Lastatempe, dum mi ordigis miajn paperaĵojn ĉehejme, mi malkovris forgesitan poemon de Marjorie, kiu ne aperis en

la lastatempe eldonita duvoluma kolekto eldonita de EAB, *Unu animo homa* (kiun mi cetere rekomendas). Eĉ se temas pri omaĝo al la londona klubo, mi opinias, ke ni rajtas ĝin aperigi ĉi tie nun por feste memori nian karan samideanon.



Marjorie kaj la tiam kolegiestrino, Alice Prochaska (kolegio Somerville), majo 2014

Por la centjara festo de la Londona Esperanto-Klubo

Marjorie Boulton, la 26-an de aprilo 2003

Hodiaŭ ni festas. Ni festas jarcenton;
ni festu fiere kaj fide;
ni festu dediĉon, la dev-diligenton,
ni festu laŭ veroj, valide.

Cent jarojn persistis la klub' en Londono,
per longaj laboroj, per multa sindono;
malgranda, mokebla, kaj minoritata,
ĝi daŭras, areto gefrata.

Ni festu per vortoj, ni festu per ritoj
pri klubo varmkore multrasa;
jen fremdaj studentoj, kaj
jen ekzilitoj, jen kamaradeco senklasa.
Jen kursoj, prelegoj kaj monda kulturo,
bultenoj kaj kantoj kaj literaturo;
pri la lingva miraklo ni daŭre atestu;
post jarcento, hodiaŭ ni festu.

Pioniroj persistis, aferoj progresis,
kaj multaj servintoj jam mortis;
en mondo neanta, defie ni jesis
kaj kontraŭ probabloj ni fortis.
Strebadis malmultaj, grupet' ŝajne febla,
kaj pruvas maleblon praktike tre ebla;
hodiaŭ al mondo ekstera ni gestu
defie; hodiaŭ ni festu.

Ne eblas sumigi la multajn sindonojn
plej ofte en preskaŭ silento,
de homoj solvintaj la multajn bezonojn,
gvidinte nin tra la jarcento,
sed hodiaŭ ni pensu pri ili kaj danku,
esperu ke tiaj future ne manku;
dum la dua jarcento sindono plu restu;
dankeme, hodiaŭ ni festu.

Eĉ rapide rigardi pasintajn programojn
registras mirindajn diversojn:
vojaĝojn, amuzojn, lumbildojn, deklamojn,
diskutojn, sciencojn aŭ versojn.
Sed apud frandadoj de scio kaj belo
flagretas lumige la pli alta celo;
ke amo, libero kaj paco pli estu:
hodiaŭ ni festu.

Hodiaŭ ni festu fiere kaj ĝoje;
sed morgaŭ ni ree laboru;
hodiaŭ ni festu, paŭzante survoje,
sed morgaŭ por streboj fervoru;
memoroj, honoroj kaj gloroj nun ravas,
sed la dua jarcento nun daŭre pli gravas;
ni nin redediĉu, fidelu kaj ardu,
kaj morgaŭ, antaŭen rigardu!

Por la centjara festo de la Londona Esperanto-klubo,
la 26-an de aprilo 2003

Hodiaŭ ni festas. Ni festas jarcenton;
ni festu fiere kaj fide;
ni festu dediĉon, la dev-diligenton,
ni festu laŭ veroj, valide.
Cent jarojn persistis la klub' en Londono,
per longaj laboroj, per multa sindono;
malgranda, mokebla, kaj minoritata,
ĝi daŭras, areto gefrata.

Ni festu per vortoj, ni festu per ritoj
pri klubo varakore multrasa;
jen fremdaj studentoj, kaj jen eksilitoj,
jen kamarudeco senklasa.
Jen kursoj, prelegoj kaj monda kulturo,
bultenoj kaj kantoj kaj literaturo;
pri la lingva miraklo ni daŭre atestu;
post jarcento, hodiaŭ ni festu.

Pioniroj persistis, aferoj progresis,
kaj multaj servintoj jam mortis;
en mondo neanta, defie ni jesis
kaj kontraŭ probablej ni fortis.
Strebdis malmultaj, grupet' ŝajne febla,
kaj pravas maleblon praktike tre ebla;
hodiaŭ al mondo ekstera ni gestu
defie; hodiaŭ ni festu.

Ne eblas sumigi la multajn sindonojn
plej ofte en preskaŭ silento,
de homoj ŝelvintaj la multajn bezonojn,
guidinte nin tra la jarcento,
sed hodiaŭ ni pensu pri ili kaj danku,
esperu ke tiaj future ne manku;
dum la dua jarcento sindono plu restu;
dankeme, hodiaŭ ni festu.

eĉ rapide rigardi pasintajn programojn
registras mirindajn diversojn:
vojaĝojn, amuzojn, lumbildojn, deklamojn,
diskutojn, sciencojn aŭ versojn.
Sed apud frandadoj de scio kaj belo
flagretas lumige la pli alta celo;
ke amo, libero kaj paco pli estu:
hodiaŭ ni festu.

Hodiaŭ ni festu fiere kaj ĝoje;
sed morgaŭ ni ree laboru;
hodiaŭ ni festu, paŭzante survoje,
sed morgaŭ por streboj fervoru;
memoroj, honoroj kaj gloroj nun ravas,
sed la dua jarcento nun daŭre pli gravas;
ni nin redediĉu, fidelu kaj ardu,
kaj morgaŭ, antaŭen rigardu!

Marjorie Boulton

Marjorie Boulton: "Ŝamano kaj Bardino"

Bob Williamson, de la redakcio: Jen kelkaj faktoj por ebligi pli bonan komprenon kaj ĝuon de la poemo "Ŝamano kaj Bardino". La poemo estis verkita de Marjorie Boulton (1924-2017) por sia gastiginto je 1994, Steĉjo Norvell (1923-2015). Li, "Stefanorvo", eminenta ĥirurgo kaj profesoro pri maligna melanomo, fakte loĝis apud Lago Ĉokolado en Halifakso. Li posedis ruĝan aŭton kun permeso-ŝildo ESPERAS. Lia tiama komputilo ("konigilo") troviĝis en la Libraro Ludovika, kaj la granda akvario estis en salona muro. Ŝi, "Mabola", prelegis al halifaksa klubo de Rotario, kaj vizitis la Bluenose Cat Club kaj la lokan esperantistaron. Li veturigis ŝin al montara regiono de Vermonto, kie ŝi prelegis dum ARE. La anglalingva poemo de H. W. Longfellow pri Hiavato utiligas saman trokean ritmon.

"Ŝamano kaj Bardino" (imitaĵo de "Hiavato")

Apud Lago Ĉokolado,
akvo per arbar' franĝita,
loĝis la ŝaman' potenca,
majstro pri la medicino,
Stefanorvo la ŝamano,
kiu brave kontraŭsorĉis
demoninon, Melanoman,
kaj murdemajn aĉajn idojn,
Ŝiajn idojn, Metastazojn.

Tra la mondo marŝis multaj
ĉar li savis ties vivojn
kontraŭ demonino nigra

kaj migremaj Metastazoj.
Kontraŭ la malvarm' kruela
havis li Avinon Stovon;
ŝi varmigis lian hejmon;
kaj li sidis serioza
en sekreta sia ĉambro,
kurba antaŭ konigilo
tre magia kaj mistera.

Ĝi informis pli precize
ol iamaj fumsignaloj
aŭ simbolaj konkobidoj.
Bele staris sur la bretoj
multaj libroj medicinaj,
aktualaj artikoloj,
liaj specialaj scioj;

en la ĉambro konigila
lumis ankaŭ liaj libroj,
libroj pri la dua fako,
en la lingvo liberiga,
pacigema por la triboj.

La ŝamano Stefanorvo
sekurigis sian hejmon
per hundego alsorĉita,
laŭte boja, nevidebla,
kaj la nomo de la hundo
estis Boja-Blufa-Bendo;
ĝi salutis lin revenen,
ĝisrevidis lin foriran.

Apud Lago Ĉokolado,
apud granda brila akvo,
havis li en sia hejmo
varman vitrovandan lagon,
tre malgrandan, sed magian,
kun varmeto alsorĉita,
alsorĉita aermovo;
tie naĝis liaj fiŝoj.

Stranga hejmo sorĉoplena!
Ho, bojado de la hundo!
Ho flirtado de la fiŝoj!
Stefanorvo nutris birdojn
sur tabulo tegmentita,
greno, nuksojn, grason donis,

ĉar li amis la birdetojn.
Vibravosto, la Sciuro,
amis lin kaj liajn nuksojn,
Vibravosto la ŝtelisto,
ruza, lerta kaj rapida.

Mabola, bardino olda,
loĝis en tre fora lando,
kie la Virbovo paŝis
iam rekte tra rivero;
tamen ŝia trib-totemo
estis la miaŭa Kato.

Iam ŝi, en ŝtalaj agloj
flugis al la Acerlando
kaj gastigis en la domo
apud Lago Ĉokolado.

Stefanorvo la ŝamano
ŝin prizorgis sorĉe-dolĉe,
faris ĉion por komforto,
ĉion por vizit' valora;
portis ŝin al mar' kaj montoj,
tra aŭtunaj arboj buntaj,
en Esperas-ĉaro ruĝa
plena de magiaj lumoj,
plena de simboloj strangaj.

Lia tablo estis plena;
ŝia lito estis pura.
Kaj aranĝis li akceptojn

ĉe diversaj Verdstelanoj,
ŝin eĉ portis al plurtriba
parolfest' sur fremda monto.
Ŝate al totemo ŝia,
eĉ aranĝis li viziton
al Blu-naza-Kata tribo.

Do Mabola ofte pensis,
de la Lago Ĉokolado,
en Esperas-ĉaro ruĝa,
ĉe la maroj kaj arbaroj,
Sur la Monto de Misteroj,
pri la multaj bonaj faroj
al bardino fremda, olda,
de ŝamano same aĝa.

Ofte ŝi en sia hejmo
sidis kun la Sanktaj Katoj,
kaj ŝi senforĝese preĝis
al Majesta Manituo,
ke la Manituo benu
Stefanorvon la ŝamano,
dum la plua viv' ĉi-monda
kaj en la Postsekva Lando.

Marjorie Boulton.

**Originale aperis en revuo *Inter Ni* (Kanado,
Novskotio: Halifakso, 1995)**

Renkontiĝoj en Kanado

[Montrealo kaj Kebekio](#): la dua kaj la lasta
vendredo de la monato, 18:00, Resto Végo (foje
okazas ankaŭ virtualaj kunvenoj, kontrolu rete)

[Viktoria Kafejo de Esperanta Kulturo](#): ĉiusabate,
10:00

[Halifaksa Videkunveno](#): dimanĉe, 11:00

[Toronta Konversacio por Komencantoj](#): dimanĉe,
13:00

[Alberta Kunvenu!](#) marde, 19:00

[Otavo Konversacia rondo tutmonda](#): la lasta
ĵaŭdo monate, 19:00

[Londono, Ontario](#): sabate je la 14-a horo

Vizitu Eventan Servon por ĉiuj detaloj!

eventaservo.org





Neforgesebla Koreujo

Suzanne Roy



Dum la aŭtuno 2023, mi vizitis Sudan Koreujon. Estis mia unua vojaĝo al Orienta Azio. Kial Koreujo? Ĉar tie mi havas amikojn. Dank' al Esperanto, kompreneble.

Tiu aventuro fakte komenciĝis en 2022. Tiam la kongreso de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj), kiu devintus okazi en Kebekurbo, estis nuligita. Sed grupo da Koreoj, kiuj jam rezervis sian vojaĝon, decidis serĉi iun por helpi ilin viziti Kebekon dum la semajno tuj antaŭ la montreala UK. Ili trovis min dank' al la mondfama "Ŝlosilo", kiu instruis Esperanton al preskaŭ ĉiuj koreaj samideanoj, kaj kiun mi bonŝance ekkonis en 2013 en Rejkjaviko. Mi tuj klarigu, ke aziaj esperantistoj kutime uzas simbolan nomon, kiun ili mem elektas, kiam ili esperantistiĝas. Tiel la tre

taŭge nomita Ŝlosilo vere iĝis por mi ŝlosilo al Azio!

Do mi tre ĝoje (kvazaŭ profesie, ĉar de jaroj mi planis ĉiujn ekskursojn por la venonta UK) konigis al ili mian landon. Dum tiu semajno mi malkovris, ke Koreoj estas ne nur seriozaj kaj kompetentaj homoj, sed ankaŭ viglaj, amuzaj, ĉarmaj... Ni amikiĝis kaj ili varme invitis min al Koreujo. Neniam invitu min, se vi ne vere volas, ke mi venu!

Kiam amikinoj miaj en Trivero ekparolis pri vojaĝo al Vjetnamujo, mi tuj pensis, ke tio estus bona okazo por viziti miajn koreajn amikojn. Mi kontaktis Tamaran (kiu por mi estas "Tamara la dua", kompreneble), kiun mi plej bone konis kaj kiu elstare laboras en la seula sekcio de Korea

Esperanto-Asocio. Ŝi tuj entuziasme respondis kaj iĝis ĉeforganizanto de mia ĉeesto en Koreujo. Ŝi kontaktis esperantistojn en diversaj urboj kaj ili kunordigis veran programon por mi, kvazaŭ vojaĝagentejo, sed multe pli interese: vojaĝo ne nur al turismaj lokoj, sed al la vera koro de la lando, ĝia popolo.

Kiel rakonti tian sperton?

Tiom da neforgeseblaj momentoj. Pejzaĝoj, monumentoj, historiaĵoj, jes, sed ĉefe homoj. Imagu: de la unua ĝis la lasta tago, sindonemaj personoj akompanis min. Ili jam konis la urbojn, la muzeojn, la parkojn... sed ili volis veni kun mi, ĉiam pluraj el ili, elspezante sian tempon kaj monon por mi, fremdulino.

Tiom da ili, karaj gastigantoj, gvidantoj, ŝoforoj, kunmarŝantoj kaj montgrimantoj! Nun mi ne aŭdacas nomi ilin, ĉar mi timas, ke mi ne povos mencii ĉiujn, kiel ili certe meritas. Nur unu mi absolute devas aparte danki: Zelkova, kiu gastigis min dum pluraj tagoj kaj eĉ akompanis min ĝis Busano. Kiam, post unu monato en Vjetnamujo, mi revenis por pasigi lastan semajnfinojn ĉe ŝi en Seulo, mi sentis min kvazaŭ revenante hejmen.



Nu, mi parolu iom pri la lando mem, ĉu ne? Kion vi ŝatus scii? Koreujo estas tre moderna, riĉa socio, kiu nekredeble rapide ŝanĝiĝis, post grava milito dum la 1950-aj jaroj. La Koreoj konstruis fabrikojn, aŭtoŝoseojn, metroojn, turojn, tunelojn... Inter sovaĝaj arbaraj montoj kreskis densaj urboj, aroj da ĉielskrapantoj. La kontrasto

estas vere surpriza. Ankaŭ mirigis min la efiko de ĝia publika transportsistemo: estas preskaŭ neniu trafiko! Neniu vico ankaŭ en vendejoj: oni trovas rapide kaj pagas per karto, foje eĉ nur per vizaĝo! Imagu, dum 15 tagoj, mi eĉ ne vidis unu monbileton!

Koreujo estas montara lando. Aroj da krutaj montetoj, unu malantaŭ la

alia. Tre malmulte da ebenaĵoj. Do pejzaĝoj tre specialaj, malsimilaj al la niaj. Dank' al miaj spertaj (kaj atletaj!) amikoj, mi havis la ŝancon supreniri kelkajn el la plej sanktaj montoj, interalie la Soraksan kaj Ĉilisan. Belegaj vojetoj, ornamitaj ne nur per ŝtonegoj kaj riveretoj sed ankaŭ per budhismaj temploj. Kaj kompreneble, mirindaj vidindaĵoj.



Ankaŭ Seulo, la modernega ĉefurbo, estas montara! Provu imagi urbon ne multe pli vastan ol la Montreala insulo, sed dekfoje (10!) pli dense loĝatan. En ĝia centro, monteto iom pli alta kaj pli kruta ol la montreala kaj ĉirkaŭe, anstataŭ riverego, montoj kaj ankoraŭ montoj! La urbo mem enhavas 10 milionojn da loĝantoj kaj la ĉefurba regiono entute pli ol 30 milionojn. Sed oni ricevas neniun homamasan impreson, tre strange.

Nun mi devas rakonti pri manĝaĵoj kaj tablokutimoj, ankaŭ ege malsimilaj al la niaj. La bazo de la korea kuirarto estas kimĉio, tio estas fermentitaj legomoj, ĉefe brasikoj sed ankaŭ multaj aliaj. Ekzistas multe da diversaj receptoj, kombinaĵoj, spicoj, fermentadoj. Oni servas ilin ĉiam, ĉie, kun ĉio! Kimĉioj havas sian propran meblon: apartan fridujon, ofte plursekcian (pro

diversaj temperaturoj). Kiam oni malfermas ĝin, ŝvebas odoro tre... kimĉia.

Mi tute ne ŝatis. Tio, kio savis min, estas la abundo kaj diverseco de la pladoj. Kaj la partigado! Ekzemple, se 10 personoj sidas ĉe restoracia tablo, antaŭ ia mendo jam estas probable almenaŭ 20 teleretoj kaj bovloj sur la tablo: estas kimĉioj kaj aliaj akompanaĵoj. Poste ĉiu persono mendas pladon. Sed ne pensu, ke vi ricevos tion, kion vi mendis! Ne. Ĉiuj pladoj estos metitaj ien ajn sur la tablo, por dividi. Eble vi neniam vidos tion, kion vi elektis, sed vi ĉiam, inter ĉio, trovos ion bongustan.

Pri kio vi ankaŭ ŝatus, ke mi parolu? Ho jes, pri la lingvo! Nu, mi scias nenion pri ĝi. Vere. Mi decidis lerni la vjetnaman kaj tute fidi la korean esperantistaron por la cetero! Sed mi lernis la

skribsistemon, kiu estas tre bela kaj originala. Tiel oni povas legi fonetike kaj foje trovi kompreneblan vorton, tre amuze. Mi komprenis: tunnel, motel kaj kelkajn aliajn. Oni ankoraŭ vidas multe da ĉinaj signoj, eĉ se la korea alfabeto ekzistas de pli ol 500 jaroj, sed la junuloj ne plu lernas la ĉinajn signojn. Modernaj Koreoj uzas nur la korean sistemon (kaj lernas la anglan, sed malmultaj vere parolas ĝin).

Mi havis okazon viziti la oficejon de la seula Esperanto-movado. La loko tre impresis min: centra, vasta, bone ekipita. Ili aĉetis ĝin (kelkajn miliardojn da ŝonoj)! Ili ankaŭ havas dungiton, kelkajn horojn semajne. Kia lukso! Sed mi ankaŭ vidis, kiel fervore la tieaj esperantistoj laboras. Ili ĉiam zorgas pri venonta kunveno, vojaĝo, alveno de fremdulo...

Post mia vizito de Vjetnamujo, mi ankaŭ tre plezure vizitis oficejon de la firmaego Samsung, kie Ŝlosilo instruas ĉiusemajne al grupo da emeritoj. Admirinda laboro kaj rezultoj!

Tre bonŝance, mi revenis ĝustatempe por partopreni la zamenhofan feston. Mi trovis ĝin tre interesa, sed multe pli oficiala (eĉ formala) ol nia montreala zamenhofa vespero. Estis okazo por revidi plurajn el miaj amikoj, kiuj eĉ venis el aliaj regionoj por tiu okazo.

La sekvanta tago, la lasta, estis dimanĉo. Flugo posttagmeze. Kion fari? Monteton, eble? Jesss! Denove, lastfoje, akompanis min miaj tre karaj koreaj amikoj. Ankoraŭ hodiaŭ, skribante pri tiu neforgesebla vojaĝo, mia koro ŝvelas pro emocio. Mi neniam povos sufiĉe danki tiujn mirindajn personojn, kiuj tiel afable bonvenigis min.

Fotoj de Suzanne Roy



“Oni simple ne planas...”

vivi en Ukrainio dummilite

Ĵenja Amis

Mi rigardas la fotojn el nia vizito al Ukrainio, en 2012. Tio estis la lasta vizito de mia edzo Joel kaj mi al Ukrainio. Mi mem poste vizitis en 2018 kaj 2019, por aranĝi ĉion por la translokiĝo de mia patrino al Kanado. Pasis jam pli ol jardeko de tiu bela vojaĝo en 2012, sed mi sentas, ke pasis ne jardeko, sed jarcento... Jen, sur la fotoj, la bela grupo de esperantistoj de



Joel kaj Ĵenja Amis vizitante Ukrainion en 2012 (Roman kaj Svitlana estas la kvara kaj kvina de maldekstre)

ĉiuj aĝoj, ridetantaj kaj feliĉaj. Ni manĝas kuketojn alportitajn de ni el Kanado, kaj diversajn Ukrainajn bongustaĵojn. Ni trinkas teon (la nepra parto de ĉiuj Esperanto-kunvenoj en Ukrainio). Ni amuzas nin per rol-ludoj, ni rakontas pri Kanado, montras fotojn, ridas. Se iu dirus al ni tiam, ke ekzakte post 10 jaroj Ukrainio plonĝos en militon, ni neniel kredus...



Vizitante Nacian Film-Oficejon de Kanado



La du junuloj - Svitlana kaj Roman — estas ĉarma paro, kiu eĉ fondis la junularan klubon, kiun ni vizitis en 2012. Ili aktiviĝis jam post kiam mi elmigris el Ukrainio en 2005, do, mi ne konis ilin antaŭ mia foriro. Ni estas amikoj en Fejsbuko, kiu tiam kaj tiam “manĝigas” al mi fotojn de tiu bela paro, jen grimpanta la montojn, jen sur la fonoj de ekzotikaj pejzaĝoj tie kaj jene en la mondo. Roman estas profesia turisma gvidanto. En la lasta foto, kiun mi vidis, kaj kiu frapis min, estis Roman vestita per milita uniformo, la unuan tagon kiel servanto en la armeon... Tio ne devas esti surprizo, ja ĉiu viro en Ukrainio nun povas esti vokita en la armeon, ja oni vivas en milita tempo, sed ial tio estis ŝoko vidi lin vestita milite. Tio estis eble antaŭ kelkaj monatoj. Kaj jen imagu mian ĝojon kaj surprizon, kiam mi legis, ke Svitlana skribis al mi pri sia vizito al Montrealo!

Ŝi venis kun du infanoj – 9-jara Diana kaj 11-jara Boguslav – por ĉ. sessemajna vizito al Kebeko, kun mallonga tempo Montreale. La montrealaj

esperantistoj renkontiĝis en sia kutima loko, Resto Végo, por bonvenigi ilin kaj aŭskulti ŝian rakonton pri la situacio en Ukrainio, fine de februaro 2024. La postan tagon ni ankaŭ iom promenis Montreale — vizitis mian laborejon: la Nacian Filmoficejon, kie ili aparte aprezis la pupojn el animaciaj filmoj kaj la tablofutbalon. Sed tie ĉi mi parolos ne pri nia agrabla montrealumado, sed pri tio, kion Svitlana rakontis al ni pri iliaj vivoj en Ukrainio. Do mi proponas ŝian rakonton, iom miksitajn kun mia propra voĉo.

“Estis eraro... ĉio baldaŭ finiĝos”

En la komenco, neniu kredis ke milito okazos. Eĉ kiam Rusio havis la armeon apud la landlimo kun Ukrainio, homoj en Ukrainio ne kredis, ke la sekvan tagon okazos invado kaj milito, rakontas Svitlana. Mi mem rememoras ankaŭ la frazon de mia amiko kaj antaŭa samlerneano: “La surteriĝo de eksterteranoj sentiĝus pli verŝajna ol milito kun

Rusio...”. Oni ne povis imagi, ke Rusio, la lando, kun kiu oni havas tiom fortajn ligojn familiajn, kulturajn, lingvajn, volos neniigi nin... La rusa lingvo estas ofta lingvo por multegaj Ukrainianoj. Ni plejparte kreskis en dulingva medio, ofte kun gepatroj jen de ukraina, jen de rusa origino, kun la geavoj loĝantaj jen en Rusio por pluraj personoj el Ukrainio, kaj jen en Ukrainio por multaj personoj el Rusio (kiu estas ankaŭ la kazo de Svitlana). “Kiam la milito komenciĝis, ni vere pensis, ke estas iu eraro. Tuj kiam oni komprenos, ke estas eraro, ĉio finiĝos”, konfesas Svitlana. Por multaj – inkluzive de mi – tiu milito sentiĝas kiel plej abomeninda perfido...

La plej bonaj falis unue...

Svitlana diras, ke ĝuste en la unuaj monatoj kaj unua jaro de milito oni perdis la plej bonajn individuojn de la lando. La eliton. La intelektulojn. Ĉar militservi volontulis ĉiuj, tre ofte ankaŭ personoj de tutlanda renomo: aktoroj, atletoj, ĵurnalistoj, muzikistoj... kaj simple ĉiuj, kiuj sentis ke estas ilia devo iri kaj defendi la landon... Unu el tiuj personoj estis mia antaŭa samklasano el la lernejo. Mi legis pri lia morto en la novaĵoj. Li estis atleto kaj organizanto de konata komunuma atleta konkurso...



Rusa Bombado de Mariupol. Foto: Mvs.gov.ua, Creative Commons, CC BY 4.0

Elektroperdoj

Se estas unu angla vorto, kiu eniris en la ĝeneralan vortoprovizon de ĉiu persono en Ukrainio inter la malfrua 2022 kaj la frua 2023, ĝi estas la vorto “blackout” – elektrohalto. En Kijivo la elektro jen estis, jen ne estis, alternante pli-malpli ĉiujn kvar horojn. Oni devis do bone plani sian vivon, komunikadon, retumadon, hejmtaskojn, lerneja-laborojn, kuiradon kaj ĉion alian ĉirkaŭ la periodoj de elektro kaj senelekto. Oni lernis vivi laŭ tiu horaro. Svitlana rakontas, ke unu fojon ŝi estis kaptita en lifto, ankoraŭ 10–15 minutojn antaŭ ol la senelektriĝo devis okazi laŭ la horaro. Ŝi diras, ridetante, ke jen ŝi praktike

lernis, ke la horaroj ne estas ekzaktaj, sed nur proksimumaj. Bonŝance, ŝia edzo Roman revenis kaj aŭdis ŝiajn frapojn kaj la vokojn por helpo. Li trovis en jutubo videon pri kiel malfermi la lifton, kaj ŝi eliris el la lifto, starante meze inter la du etaĝoj. Svitlana diras, ke ne estis danĝere, kaj ke nuntempe en Kijivo la senelektrigoj ne okazas – aŭ okazas malofte, bonŝance...

La infrastrukturo damaĝita

Aparte en la komenco de la invado, multaj objektoj de la urba infrastrukturo en diversaj urboj, kaj, kompreneble, ankaŭ en Kijivo, estis damaĝitaj. T.e., la lokoj, kiuj provizas kaj purigas la akvon, generas kaj distribuas la elektron, ktp. Tio ege malfaciligas la ĉiutagan vivon. Dum Svitlana parolas pri tio, mi rememoras la kanadan ŝtormon de printempo 2023, kiu trafis Orientan Kanadon, kiam ni mem perdis elektron por iom da tempo... Estas nur en tiaj momentoj, kiam ni memoras, en kiom komfortaj kondiĉoj ni loĝas, kiam ni perdas tion, eĉ nur por kelkaj horoj aŭ kelkaj tagoj... Mi aldonu, ke tiuj damaĝoj de la infrastrukturoj ne estis hazardaj — ili estis zorge planitaj, por trafi ekzakte tie, kie ĝi plej doloras kaj trafos kiom eble plej multe da homoj...

La vivo kun haltoj

Kiam oni aŭdas la sirenon, oni devas iri al la plej proksima ŝirmejo por kaŝiĝi de aeratako. Tio estas la rutino por ĉiuj loĝantoj de la lando. Kiam oni observas rusan aviadilon, eĉ tute fore, eĉ ekster la limoj de la lando, oni anoncas la eblan atakon. Se oni estas en transporto, oni devas eliri el ĝi. Se oni estas en la lernejo aŭ infanĝardeno, universitato, laborejo aŭ kiu ajn alia loko, oni iras suben por kaŝiĝi, kaj oni restas tie ĝis la minaco estas for. Do, oni iom al kutimiĝis al la interrompoj al la ĉiutaga vivo. Oni estas preparita por tio – kun poŝtelefonoj plene ŝargitaj, kromaj poŝtelefonoj ŝargiloj, etaj lampoj, manĝetoj... “Kijivo estas nun la plej sekura urbo en Ukrainio, sed certe ne 100-procente, ĉar estas milito”, diras Svitlana. Tuj



Infanhospitalo en Mariupol, marto 2022. Foto: armyinform.com.ua, Creative Commons, CC BY 4.0,

poste ŝi aldonas, ke nur 5 km de ŝia domo falis restaĵo de raketo, kiu damaĝis domojn kaj mortigis 7 homojn... Eble, la vorto “sekura” estas tre relativa...

Familioj dividitaj

Post nia kunveno kun Svitlana, mi metis kelkajn fotojn en Fejsbukon. Ŝi sidis apud unu el niaj klubanoj, kaj mi memoras, ke unu amiko skribis: “Bela familio”. Mi devis klarigi, ke la persono apud ŝi ne estas ŝia edzo – kaj ke ŝia edzo Roman estas en la armeo (homoj de militserva aĝo ne rajtas foriri el la lando)... La edzo de Svitlana, Roman, studis medicinon – kaj eĉ se li laboris nelonge laŭ sia medicina fako (epidemiologio), li tamen estis prenita en la armeon kiel kuracisto, kun la rango de leŭtenanto.



Mapo de la milito, je la fino de januaro 2023.

La realo de pluraj familioj en Ukrainio estas ke ili estas dividitaj. La viroj estas en la armeo — ĉu volontule, aŭ vokite... Pluraj virinoj kaj infanoj foriris el la lando. Fakte, esperantistoj bone organiziĝis por helpi al rifuĝintaj ukrainianoj. La plejparto de esperantistoj el Ukrainio tamen restis en Eŭropo, sed mi konas kelkajn, kiuj iris ankaŭ al Ameriko. Svitlana diras, ke en Ukrainio ŝi

diplomiĝis pri la franca kaj la angla, sed ke antaŭ la milito ŝi ne multe uzis la francan. Sed tio evidentiĝis ege utila, kiam ŝi iris loĝi kun la gefiloj en Francio. Kompreneble, la franca tre utilas ankaŭ nun, vizitante Kebekion. (Svitlana rakontas, ridante, ke ŝia gastiganta familio en Francio trovis bonan manieron lerni la ne-tro-facilan-por-ne-slavoj nomon de ŝia filo: Boguslav, kiu estis ĉarme

nomita “Beau-gosse-slave” – bela slava knabo, en la franca lingvo). Ŝiaj infanoj ankaŭ iom parolas la francan, kaj eĉ iris al la lernejo en Francio.

Sed... la prezo de tiu sekureco estas apartiĝo de la

familioj... Mi demandis al la infanoj, kiu estas ilia plej ŝatata loko en la mondo. Diana respondas senhezite, Ukrainio...

Laceco instaligās

Post la komenca sento de socia devo, kiam pluraj personoj volontulis por la armeo, nun, pli ol du jarojn poste, laceco instaligās. Tiu sento de laciĝo eĉ pliiĝis post la longe atendata, sed apenaŭ sukcesa, kampanjo de kontraŭatakado, pasintaŭtune. Kompreneble, la granda parto de tiu kulpo pezas sur ni, la Okcidento, kiu ne sufiĉe provizis per armiloj... Sed la realo estas, ke la homoj, kiuj volontulis militservi antaŭ du jaroj, volas – kaj devas – iom ripozi, kaj la kvanto de volontuloj nun ne sufiĉas por liberigi la personojn, kiuj batalas, tro laciĝitaj, dum tro longa tempo...

La vivo daŭras

Oni ne povas esti en streĉo pri milito la tutan tempon. La homoj iras al kinejoj, kafejoj, kunmanĝas, kuntrinkas, babilas kaj kunridas, diras Svitlana. Rigardante tion de ekstere, oni eble povus foje iluzie pensi, ke fojfoje oni forgesas, ke estas milito. Sed jen la milito revenas en la konversacio, ĉar ĉies amikoj kaj familianoj estas

jen en la armeo, aŭ jen tiam kaj tiam venas la sono de sireno kaj la tempo kaŝiĝi, se estas antaŭvidita atako...

Svitlana notas ankaŭ la ŝanĝiĝojn en la kulturo — aparte de la populara kulturo. La kantoj pri la milito kaj la sopiro pri la amatoj, iom kiel tiuj dum la Dua Mondmilito, estas parto de la nuna kulturo kaj arto en Ukrainio. Alia parto estas danki la armeon en la komenco de ĉiuj eventoj. Jen ni estas en tiu bela teatro (kinejo, kafejoj), komfortaj, kaj ni estas dankemaj al la armeo, kiu batalas, por ke ni povu ĝui tiun belan tagon (vesperon) ktp.

Oni ne faras planojn...

Iu saĝulo diris, ke, se oni volas ridigi Dion, oni rakontu al Dio siajn planojn. Do, en Ukrainio nun oni simple ne planas. Ĉar neniu scias, kiel aferoj iros kaj kio okazos morgaŭ. Dum ni promenis en la Malnova Urbo, mi memoras Svitlanan diranta, “nu, ni ne scias, kio alia okazos en Eŭropo, poste”. Jes, post la milito en Ukrainio, aŭ eble dum ĝi. Ĉu la milito estos lokita en Ukrainio, aŭ ĉu ĝi saltos preter la ukrainajn limojn kaj plonĝigos ankaŭ alian parton de Eŭropo en militon? Tristaj pensoj...



Kun esperantistoj en Montrealo

Kio poste?

Garry Evans demandis, kiel Svitlana vidas la solvon de la milito. Malfacila demando. Kompreneble, oni ne konas la respondon... Eĉ se Ukrainio (espereble) gajnos, ne estas klare, kiel la lando povas reintegrigi. Ekzemple, kiel la orienta parto (Donbaso, Lugansko) povus unuiĝi kun la cetero de la lando – pri tio mi dubas, persone... Kaj krome, kun tiom da vivoj perditaj por defendi ĉiun centimetron, la investo de la lando estas tro alta por konsideri la cedon de certaj teritorioj interŝanĝe al la ĉeso de la milito...

Finaj pensoj

Mia koro doloras. Mi volas reveni en la tempo, antaŭ tiuj 12 jaroj, kaj trinki teon kaj manĝi



Promenante en la montreala urbocentro

kuketojn, ludante rol-ludojn kaj rakontante pri Kanado. Mi volas ke Svitlana kaj Roman, la infanoj, estu kune, kaj ke unu tagon ili vizitu Montrealon ĉiuj kune, kvarope. Mi volas ke ili estu sekuraj kaj ne devu fari korŝirajn elektojn. Mi provas foje kompreni, ĉu la mondo rompiĝis en unu momento, aŭ estis pluraj etaj rompiĝoj, kiuj okazis tiam kaj tiam, kiuj fine alĝvidis al tiu situacio. Mi revas, ke unu tagon mi vekiĝos por konstati, ke la milito estis nur koŝmaro, malbona sonĝo... Kaj mi volas ke esperantistoj – kaj ĉiuj homoj de la mondo – konsentu pri almenaŭ unu principo: ke la vivo de ĉiu persono estas sankta kaj neprenebla, kaj ke la devo de ĉiu persono estas esti instrumento por la paco.



Vizitu la retejon de KEA!

Kiom ofte vi kontrolas la ligilon pri [Novaĵoj](#) en la retejo de [KEA](#)? Estrarano pri Sociaj Retoj, Jordan Zero, sufiĉe ofte ĝisdatigas ĝin per novaj informoj. Ekzemple, ekde ĉi-jarkomenco aperas Tagordoj de la ĉiumonataj Estraraj Kunsidoj. Ĉu vi iam demandis vin pri tio, kion faras KEA? Ĉu vi havas opiniojn pri tio? Ligiloj troveblas al la ĉiumonata Renkontiĝo Brazilo-Kanado, kune kun haveblaj registraĵoj. Troveblas informo pri stipendioj (t.e. mono por vi) kaj invitoj al aliaj oportunoj, ekz. nia serĉo por Landa Organizanto por Pasporta Servo. Eĉ muziko troveblas. Iom post iom, tiu ligilo fariĝas historieto de KEA jam dum la pasintaj du jaroj, kaj ĝi daŭre kreskas. Ĉu vi mem havas novaĵon pri via loka klubo aŭ aktiveco? Bonvolu dividi kun ni, kaj ne maltrafu la novaĵojn.



Karnavalo en Brazilo kaj Lingvoj en Kanado

Dum la februara eldono de RBK — Renkontiĝo Brazilo-Kanado, okazis interesege prelego de Wilian Gomes (Vilĉjo) pri Karnavalo en Brazilo. La sekva (marta) eldono estis la vico de Kanado prezenti, kaj Nicolas Viau prelegis pri Lingva politiko en Kebekio kaj Kanado. Vidu tiujn ĉi kaj antaŭajn prelegojn (jen pri Brazilo, jen pri Kanado) en Jutub-kanalo www.youtube.com/@miaamikoesperanto Se vi ne partoprenis en RBK, ni elkore invitas vin. Detaloj estas sendataj al membroj de KEA kaj ESK retroŝte.



Ŝerco: Mi supozis, ke la sekigilo ŝrumpigis miajn vestaĵojn. Efektive estis ĉiam la friduĵo (sendis Bob Williamson)

Pasporta Servo: landa organizanto bezonata!

KEA serĉas novan volontulon por esti la Landa Organizanto de Kanado por Pasporta Servo. La taskoj de la Landa Organizanto estas:

- Esti la kontaktulo por homoj de la lando, kiuj volas informiĝi pri PS, precipe tiuj kiuj ne havas facilan retaliron.
- Kontakti kaj peri petojn pri aliĝo, ŝanĝo, malaliĝo, k.s. de membroj de PS, ĉefe tiuj kiuj ne havas facilan retaliron.

- Kontroli presprovaĵon de la papera adreslibro de PS rilate al landaj skribkutimoj (formo de adresoj, telefonnumeroj, kaj simile).
- Helpi informi pri PS per komunikiloj de la landa movado (revuoj, forumoj, dissendolistoj, ktp.) kaj instigi homojn al uzado kiel gastoj kaj kiel gastigantoj.

Se vi interesiĝas pri tiu posteno, bonvolu sendi mesaĝon al saluton@pasportaservo.org.

Pasporta Servo

2017



Kongresu Sud-Kalifornie


12-a de julio—15-a de julio 2024, California State University, Dominguez Hills. Buntega programo, ekskursoj, muziko kaj arto! Eĉ la retejo de la kongreso estas ludema kaj juneca – kiel... Kalifornio!

<https://www.usonakongreso.org/>



Katoj miaŭas, anasoj kvakas!

Spektu belegan videon de nia amiko kaj kunlaboranto, Alekso Miller, el Usono, kiu reklamas la Kanadan Virtualan Kongreseton (6-an de aprilo) - KVAK-7. Dum tiu virtuala kunveno oni parolos pri la UK en Vankuvero en 1984. Ni kunfestu la 40-jariĝon de tiu historia evento! <https://youtu.be/SLGAqNcUkM0>



Subvencioj por MeKaRo kaj Usona Kongreso

KEA pretas doni kelkajn subvenciojn al junaj KEA-anoj por helpi al ili ĉeesti MeKaRon (18-20-a de majo en Montrealo) kaj la Usonian Kongreson (12-15-a de julio en Los-Anĝeleso).

Stipendioj haveblas de po 200 CAD por MeKaRo kaj de po 500 CAD por la Usona Kongreso. Pro

financaj limigoj, ni ne povas garantii sukceson al ĉiu petanto.

Por havi ŝancon ricevi subvencion, sendu retroŝtan petleteron antaŭ la fino de aprilo al informo@esperanto.ca.

Zamenhofaj festoj 2023


Sendu al Lumo rakontojn kaj fotojn pri viaj kunvenoj!

Toronto: La 16-an de decembro Esperanto-Toronto okazigis ĝueblan Zamenhofan feston. Estis ŝanĉbufedo kaj formala klubkunsido, kie ni diskutis planojn por la venonta jaro, kaj elektis la novan estraron de la klubo. Ni ankaŭ gastigis du gastojn kiuj venis de Kingstono!



Montrealo: Post manĝado kaj iom da libera babilado, komenciĝis malgranda kultura programo kun, interalie kantado kaj Kebekiaj muzikaj tradicioj (“turlutado”, kulerludado) kaj prelegetoj. Oni ankaŭ malfermis “novan ĉapitron” de la asocio per inaŭguro de nova montreala kluba libro. La unuan oni inaŭguris en 1984, kaj ĝi enhavas subskribojn de partoprenintoj de kunvenoj ĝis 2023!

Biblioteka Vespero en Montrealo (marto 2024)



Martin Morris, nia bibliotekisto, prelegis pri la biblioteko kaj la katalogo de KEA + ESK



Martin Morris kuiris kaj servis la verdan supon
(estis bongustege!)



Nicolas Viau, la prezidanto de ESK, havis surpriz-festeton
kun la kuko por sia naskiĝtago



Nekrologo: Maurice De Kinder

“Oni ne zorgu pri la jaroj, sed simple vivu”

Zdravka Metz

Mi tralegis tre interesan intervjuon kun Maurice De Kinder (1926 –2023), kiu aperis samtempe kiel la nekrologo pri li. Mi dankas al Andy Blair, kiu trovis ĝin kaj sendis al mi.

Mi plezure legis pri Maurice De Kinder, ĉar mi konis lin nur kiel esperantiston, ĉar li rakontis al mi pri sia esperanta korespondado, dum miaj du vizitoj en la printempo 2022, kiam ni preparadis UK-on en Montrealo.

La LKK de UK en Montrealo prezentis S -ron Maurice De Kinder al kongresanoj, la 7-an de aŭgusto 2022, ĉe la solena malfermo, kiel la plej maljunan esperantiston en Kanado.

La UK-anoj aplaŭdis lin, kiam li modeste ekstaris en la publiko. Ni donacis al li, antaŭ la komenco de la solena malfermo, la historian libron: **30 jaroj da agado**, de Esperanto-Societo Kebekia, kio agrable surprizis lin.

Kiam mi alvenis al la maljunulejo, kie li vivis tiam,

li jam sidis ĉe la enirpordo kaj atendis min. Li tenis unu Esperantan libron kaj unu floron enmane. Tio devis esti la maniero por ke mi rekonu lin — tiel ni interkonsentis. Mi ja rekonis lin, ĉar unu fojon, antaŭ kelkaj jaroj, li venis al restoracio Végo, por ĉeesti nian vendredan kunvenon.

Do, kiam mi vizitis lin la unuan fojon en la printempo 2022, li invitis min eniri manĝejon, kaj ni sidiĝis ĉetable. Neniu krom ni estis tie, kaj regis silento post la finita matenmanĝo. Tio gravis, ĉar kun siaj aŭd-aparatoj, li povis pli bone aŭdi kaj kompreni min.

Kompreneble, li bone parolis Esperanton, kiun li scipovis de tre longa tempo, ĉar en la gepatra domo ofte renkontiĝadis esperantistoj de Montrealo.

En 1962, la tiama Grupo Esperantista de Montrealo ŝanĝis sian nomon al MEK (Montreala Esperanto-klubo). La patro, Frank De Kinder, estis tiam ankaŭ elektita unua prezidanto de MEK.



Maurice De Kinder rakontis al mi, ke, iom post iom, krom la patrino, ankaŭ du aliaj gefratoj De Kinder lernis Esperanton, kaj li, Maurice mem, eklernis sole, uzante la instrulibron de Pastro Paul Durette: Praktika Esperanto.

Tiam Maurice jam interesiĝis pri kolektado de poŝtmarkoj, kaj li lernis Esperanton por korespondadi.

Maurice memoris la unuajn leterojn, kiujn korektadis Pastro Paul Durette. Li korespondadis kun trideko da esperantistoj el Eŭropo: Ĉeĥio, Slovakio, Pollando, Finnlando, Hungario, Germanio kaj el aliaj eŭropaj landoj.

En 1966, Maurice decidis viziti Pragon survoje al la UK en Budapeŝto (Hungario) kaj volis renkonti sian unuan korespond-amikon. Tiu amiko devis labori, estinte jam inĝeniero, sed tamen eĉ se estis labortago, la korespond-amiko alvenis ĉe la interkonsentita hotelo por renkonti Maurice-on. Li povis nur saluti lin kaj prezenti al Maurice la Esperanto-amikinon, ĉar li mem devis reveni al sia laboro. Do, estas tiu amikino, kiu havis la tempon por promeni kaj vizitigi la belan urbon Prago al Maurice. Estas interese, ke Maurice korespondis ankoraŭ lastjare kun tiu sama amiko el Prago kaj plezure sendadis al li ĉiujare novajn kanadajn poŝtmarkojn.

En 1968, MEK ricevis senpagan kunvenejon de urbo Montrealo – la sport-ludejon Père-Marquette. Post la anoncoj pri la komenca Esperanto-kurso, estis tiom da enskribiĝoj, ke MEK-anoj decidis gvidi du kursojn ĉiumerkrede, do samloke kaj samtempe: unu gvidis Frank De Kinder kaj la alian la filo, Maurice De Kinder.

En 1969, okaze de la fino de la kurso, Maurice organizis dancvesperon, eĉ honore al sia patro Frank. Dancvesperon ĉeestis ankaŭ MEK-anoj kaj Esperanto-kursanoj. Frank De Kinder estis la unua prezidanto de MEK, estrarano de Kanada Esperanto-Asocio, fondita en 1958, kaj membro de Universala Esperanto-Asocio.

Samjare, Maurice spertis kaj partoprenis UK-on en Helsinko (Finnlando) kaj ekhavis plian intereson por Esperanto.

Maurice De Kinder estis profesie kontisto kaj programisto; li laboris en Montrealo. Kiam li translokiĝis al Saint-Jean-sur-Richelieu, post la morto de sia patro en 1971, li daŭre kaj ĉiutage venadis labori al Montrealo.

Li havis familion: 4 infanojn, kiuj vivas fore de Montrealo, 7 genepojn kaj 4 pranepojn.

Kiam Maurice emeritiĝis en 1993, li decidis reveni al Montrealo kaj vivi en sia naskiĝurbo. Li ekloĝis en apartamento por maljunuloj, proksime de la



**Maurice De Kinder kun la teamo de la UK-2022 (Zdravka Metz, Bob Williamson, Normando Fleury).
Fotoj: John Huang, dum la Universala Kongreso 2022 en Montrealo**

metrostacio Laurier.

Maurice lernis uzi la reton kaj tiel ni interŝanĝis kelkajn pliajn leterojn. Li petis min trovi novan korespondamikon, kiu volus interŝanĝi verajn leterojn. Do, li daŭre havis intereson por poŝtmarkoj.

Mi ne konis S-ron De Kinder kiel pian-ludanton kaj volontulon, kaj mi ŝatus rakonti pri tio, kion mi legis pri li.

Mi povas imagi lian pianludadon de 400 muzikeroj el sia klasika kaj populara repertuaro, kiujn li regule kaj laŭmemore ludis por malsanuloj en du hospitaloj en Montrealo kiel volontulo dum 22 jaroj.

Kiam Maurice ion ŝatis, li donis ne nur sian tempon, sed ankaŭ sian koron kaj animon. Kiam li rimarkis, ke lia muziko feliĉigas aŭskultantojn, li same estis feliĉa, kaj tio stimulis lin revenadi kaj pianludi. Pianon li komencis lerni sole, kiel

kvarjarulo, kaj la plej juna inter la ses infanoj de Frank De Kinder. Mi menciuj, ke du liaj fratinoj ludis pianon, unu fratino kaj unu frato ludis violonon, kaj la fratinoj kantis.

Estas la patro, kiu instruis al Maurice legi la muzikon kaj trovi la notojn sur la piano, kiam li estis ses aŭ sepjara. Kiel 18-jarulo, Maurice eĉ donis koncerton de Chopin en la halo de la loka preĝejo; ĝi estis tre sukcesa, sed laŭ la sugesto de profesia profesoro de muziko, Maurice devis serioze eklerni teknikon, stilon kaj muzikan disciplinon dum tri jaroj. La patro, kiel operkantisto, tenoro, ŝatis kanti, kiam Maurice pianludis. Tamen la patro ne laboris kiel kantisto, sed li havis domojn por lui, kaj la familio vivis de la rentumoj.

Laŭmemore de Maurice, la patro estis tre severa kaj postulema persono, kaj certajn familiajn miskomprenojn li solvis nur pli poste, kiam li mem estis plenkreskulo.

Maurice De Kinder vivis laŭ la “sekreto” de sia patrino, kiu parolis Esperanton kaj same ŝi tre ŝatis muzikon – ŝi volis vivi ĝis 100! Maurice estis 97-jara, kiam li mortis, la 12-an de decembro 2023. La ĵurnalisto, kiu intervjuis Maurice De Kinder kiel volontulan pianludanton por la Paliativaj Servoj de McGill, sugestis, ke eble ankaŭ

li havas sekreton: simple vivi la vivon. Maurice konsentis. Eble bona sekreto ankaŭ por ni: ***Oni ne zorgu pri la jaroj, sed simple vivu.***

Pli pri Maurice De Kinder en la artiklo de la [Paliativaj Servoj de McGill](#) (en la angla).

Nekrologo: Jean E. Smythe

Bob Williamson

Jean E. Smythe de Nanaimo, BK, mortis la 5-an de marto 2024, 92-jaraĝa.

Jean naskiĝis en Gorleston-on-Sea kaj pasigis la unuajn jarojn de sia vivo en Anglio. Ŝi ĉiam interesiĝis pri lingvoj, muziko kaj vojaĝado. Je la aĝo de 22 jaroj ŝi ekvojaĝis, unue al Novjorko, Toronto, Florido, kaj poste al Alberto pro laboro. En la jaro 1956 en Kalgario ŝi edziniĝis al brito, Jim Smythe, kaj pasigis la sekvajn tri jardekojn tie. Ŝi naskis tri infanojn.

Tra la vivo, Jean sekvis siajn celojn kaj interesojn: licenciĝo pri lingvistiko, vojaĝoj al Ĉinio,



Galapagoj, kaj multnombraj aliaj interesaj lokoj. Post la emeritiĝo de Jim, ili translokiĝis al Nanaimo por ĝui pli mildan klimaton. Ŝi ŝatis ĝardenumadon, fotografadon, Esperanton,

vojaĝadon, gazonpilkon kaj ĉion, kio spronis sian intereson. Interalie, ŝi estis dumviva membro de KEA kaj ĉeestis la Vankuveran UK-on en 1984. Post la morto de Jim en 2014, ŝi brave rete serĉis kaj trovis kunulon, Derek-on Pritchard de Ladysmith, kiu mortis nur fine de 2023. Ŝi pace, akcepte, kaj kontente mortis post mallonga lukto kontraŭ kancero.

Konkursema, inteligenta, aventurema kaj amema, avinjon Jean supervivas tri infanoj, kvin genepoj kaj multaj familianoj en Anglio. Karitataj donacoj estas bonvenaj laŭ via bontrovo. KEA kore dankas al filino Anne Longley pro la informo.

Kanada Esperanto-Asocio

La estraranoj de KEA dum 2024–2025:

- Prezidanto: Garry Evans — Montrealo QC
- Vic-prezidanto: Geoffrey Greatrex — Otavo ON
- Kasisto: Raymond Brisebois — Londono ON
- Sekretario: Bob Williamson — Halifakso NS
- Redaktoro: Ĵenja Amis — Montrealo QC
- Estrarano: Andrew (Andreo) Sly — Viktorio BK
- Estrarano: Luis Obando – Toronto ON
- Estrarano: Trefleo Mercier – Ŝerbruco QC
- Estrarano: Jordan Zero – Barrie ON

Adreso:

110 Grand Ave. 414, London, Ontario, N6C 1L8,
Kanado

Retejo: <https://esperanto.ca/>

Facebook: [facebook.com/
KanadaEsperantoAsocio](https://www.facebook.com/KanadaEsperantoAsocio)

YouTube: [youtube.com/channel/
UCVBXZyk2N436ot4qlug-2ng](https://www.youtube.com/channel/UCVBXZyk2N436ot4qlug-2ng)

Lumo

Redaktoro: Ĵenja Amis. **Provlegistoj kaj helpantoj:**
Bob Williamson, Francisko Lorrain, Sylvain Auclair.

Esperanto-Societo Kebekia

La estraranoj de ESK dum 2024–2025:

- Prezidanto: Nicolas Viau
- Vic-prezidanto: Joel Amis
- Kasisto: Garry Evans
- Sekretario: Sylvain Auclair
- Estrarano: Normand Fleury
- Estrarano: Gabriel Labrie
- Estrarano: Eveline Ménard

Adreso:

Société québécoise d'espéranto
6595 rue Briand, Montréal (Québec) H4E 3L4,
Kanado

Retejo: <http://www.esperanto.qc.ca/>

Facebook: [https://www.facebook.com/
EsperantoQuebec](https://www.facebook.com/EsperantoQuebec)

Pasporta Servo

Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi
esperantistojn ĉe vi: www.pasportaservo.org.

Vi povas ankaŭ kontakti Jed-on Meltzer
<jedmeltzer@gmail.com>, kiu estas la peranto
por Kanado. **Estu la nova peranto de PS!**